

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ lokakuu ♦ oktobro ♦ 4-5/2010



Partoprenantoj de Internacia Junulara Kongreso dum vizito al Matanzas, fotitaj antaŭ statuo de la poeto José Martí. Artikolo de Keke Uber sur p. 9.

Atilio ja maailmankongressi lehdissä, s. 25

Mongolio, p. 6 ♦ Universalaj kongresoj, p. 8, 14

Vintraj Tagoj, p. 18 ♦ Valamo, p. 20 ♦ Zamenhof-semajno, p. 21

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 044 3933 924 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhintaa/Prenumerationspris/Abonprezo: 22 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Paula Niinikorpi, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@kotikone.fi

Markus Sunela, Kalevan puistotie 16 B 23, 33500 Tampere. ☎ 040 768 5165 ✉ markus.sunela@iki.fi

Keith (Keke) Uber, Petter Wetterin tie 4 A 47, 00810 Helsinki. ☎ 040 413 4252 ✉ keith_uber@yahoo.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Robert Bogenschneider, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori ✉ robog@gmx.de

Arvo Karvinen, Piikintie 22 as 10, 00680 Helsinki. ☎ 040 502 3765 ✉ arvo.karvinen@elisanet.fi

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>



Relativaj roloj

La Aŭtunaj Tagoj ekskurse al niaj esperantistaj amikoj en Estonio estis itinero, kiu multon instruas pri historio kaj ĝia relativeco. Antaŭ preskaŭ precize 19 jaroj, kliko en

Moskvo kaptinta regpovon de Sovetunio (kaj falinta post tri tagoj) ordonis al generalo Ĝoĥar Dudajev (1944–96) marŝi laŭ la sama itinero al Tallinn kaj per militforto neniigi la ĵusan eksigĝon de sovetrespubliko Estonio el la unio kaj resendependiĝon de respubliko Estonio. Dudajev, komandanto de aerarmea divizio de la soveta armeo en Tartu, rifuzis obei. Ĝis jarfino 1991 dissolviĝis Sovetunio. Estonio ne suferis sangoverŝadon en la procezo. Tion oni dankas al Dudajev; li okupas heroan lokon en la Estona historio.

Estas simileco inter Ĝoĥar Dudajev kaj C.G. E. Mannerheim (1867–1951). Generalo en la cara armeo, komandanto de armea grupo en la mondmilito, li ekŝiĝis el la Ruslanda servo fine de 1917 kaj revenis al sia patrujo Finnlando deklarinta sian sendependiĝon en decembro. Same Dudajev revenis al sia patrujo Ĉeĉenio aspiranta al sendependiĝo. Ambaŭ renkontis hejmlandon tute ne unuecan, kaj rolis en civila milito. Dudajev estis mortigita en la unua Ĉeĉenia milito; Mannerheim restis en plej alta armea pinto de Finnlando, dudek jarojn figuro akre dividanta la popolon, sed en kaj post la novaj militoj (1939–40 kaj 1941–45) unuiganta – eble la nura homo, kiu havis por tio sufiĉan aŭtoritaton. – Ni ne povas scii, ĉu Dudajev estus sukcesinta havi similan aŭtoritaton en postaj malfeliĉaj periodoj de Ĉeĉenio tute malsimilaj al tiuj de relative trankvila Baltio.

Reven-ekskurse de Tartu ni haltis duonvoje por kelkaj horoj en Paide. Tie, sur la placo de tiu urbeto kun okmilo da loĝantoj, estis voĉlegita la deklaro de sendependeco de Estonio en la 25-a de februaro 1918. Tiam la potenctenanto en la lando estis la okupacia administracio de la Germana armeo kaj la komandanto de ĝia Balta Divizio, generalo Rüdiger von der Goltz (1865–1946). La generalo agis de aprilo ĝis decembro de tiu jaro en Finnlando, kie liaj trupoj venkis en Helsinki kaj Lahti en sudo la ribelantpartion de la Finnlanda civila milito, dum la registaraj trupoj de Mannerheim konkeris Tampere en nordo.

Oni preparis monarĥion en Finnlando – Germana princo jam estis elektita kiel reĝo. La planon faligis la fino de la milito, kaj Finnlando fariĝis respubliko. (Estas interese atenti, ke inter liberaluloj pledantaj por respubliko estis la juna studentino Irja Klemola, kiu spitis la opinion de sia monarĥiista familio – tiutempe tre radikalece.) Post la malvenko de Germanio en la granda ▷



R. Bogenschneider

Memortabulo sur la urbodoma muro de Paide sciigas, ke la sendependeco de Estonio estis ĉi tie proklamita la 25-an de februaro en 1918.

Matti, mi kaj Mari

Post ke ĉi tiu gazeto en junio lastan fojon aperis, Finnlando transiris en novan periodon: la ĉefministro ne plu estas Matti Vanhanen. Post sep jaroj li retiriĝas el la posteno kaj el tuta politiko, evidente iom lacigita kaj frustriĝinta pro la debato pri financado de la partioj. Kiom pro siaj propraj eraroj kaj kiom pro la ĝenerala etoso kaj situacio, tion mi ne volas ĉi tie plie analizi. Per la sep jaroj li estas unu el la plej longtempaj ĉefministroj en Finnlando.

Mi rimarkas, ke la karieroj koincidas: Mi prenais la ĉefredaktoran taskon duonjaron post ke Vanhanen iĝis ĉefministro, kaj mi ankaŭ lasos la taskon duonjaron post li.

Mi kredas, ke mi mem ne estas la sola, kiu vidas personajn similecojn inter Matti Vanhanen kaj mi: Ambaŭ ni estas altaj kaj magraj viroj, kaj silentemaj kaj trankvile kondutantaj. Kaj unu speciala kunligo estas la hobbio de astronomio. Mi ne konas lin persone per astronomia hobbio, sed estas publike konata fakto, ke li en sia juneco estis tre aktiva kaj lerta en hobiastronomia observado. Tion li tamen estas pli aĝa ol mi, ke li jam ĉesis sian aktivan periodon en tio antaŭ ol mi komencis pli aktivi.

Persona simileco produktas ian simpation inter homoj. Mi nun konfesas, ke kiam Vanhanen komencis la laboron de ĉefministro, mi pensis, ke li estas tre bona ulo. Mi povis scii, ke lia politika ideologio ne pleje kongruas kun la mia, sed mi pensis, ke tia trankvile kondukanta ulo certe pensas pri siaj agoj bone kaj studas pri faktoj precize kaj ne faras pro hasto aĉajn decidojn.

Baldaŭ poste mi pli kaj pli vidis liajn malbonajn flankojn. Pli kaj pli komencis mal-



plaĉi al mi la agmanieroj, kie oni ne aperte diskutis kaj rifuzis respondi al ĵurnalistoj pri esence gravaj demandoj. Lia politika idealo pli klariĝis al mi kaj evidentiĝis esti pli draste kontraŭ mia propra ol kion mi povis komence supozi. Nu, mi ne diras, ke li estis tute malbona ĉefministro, sed fine mi estas feliĉa, ke li foriris kaj opinias, ke tio devis okazi multe pli frue. La skandalo pro financado de la partioj (ĉu oni jam kuraĝas diri, ke ni havas korupcian skandalon?) estis jam longe troa.

Nun Finnlandon regas nova ĉefministro, Mari Kiviniemi. Ŝi estas nia dua ina ĉefministro, sed la kariero de la unua iĝis tiom mallonga, ke oni emas pensi, ke Kiviniemi estas reale la unua ĉefministrino.

Novan kaj freŝan etoson Kiviniemi portas al la estrado de Finnlando almenaŭ pro fremdaj lingvoj. Matti Vanhanen ne imponis pro lingvoscio. Krom la finna li parolas la anglan iel tiel, ke li povas en internaciaj rilatoj pene agi per ĝi, kaj la svedan en nivelo, kies aŭskultado estas malkomforto por ĉiuj. Kiviniemi parolas la anglan (mi ne havas klaran indikon, ĉu pli bone ol Vanhanen, sed kredas ke jes) kaj flue la svedan kaj la germanan. Tio devas esti konsiderata vasta lingvoscio – estas ja malmultaj homoj, kiuj reale povas esprimi siajn pensojn krom sia propra lingvo per tri aliaj.

En sia vizito en Germanio Kiviniemi jam vokis admiron per paroli en flua germana. Tamen indas noti, ke prizorgo de eksterlan-

daj rilatoj de la lando neniam povas dependi nur de la lingvoscio de la politikaj estrantoj. Profesiaj interpretistoj ja ekzistas por tio, kaj nepre indas ilin uzi. La persona lingvoscio de la estrantoj povas porti nur ian plian nuancon. Kaj minusa flanko ĉiam estas, ke se oni emfazas rilaton al iuj landoj per tio, povas okazi, ke la aliaj rilatoj estas neglektataj.

En kazo de Kiviniemi, ŝia lingvoscio klare emfazas la okcidentajn rilatojn de Finnlando. Scio pri la sveda kondukas al proksimeco al ĉiuj skandinavaj landoj, la germana al okcidenta Mez-Eŭropo, kaj la angla ja teorie pleje al Britio kaj Usono, kvankam nuntempe praktike pli-malpli al ĉiuj partoj de la mondo. Sed lingvojn por specife uzi en niaj orienten direktantaj rilatoj Kiviniemi ne parolas. Antaŭ nemallonge Kiviniemi tamen montris reformeman sintenon al nia orienta najbarrilato kaj la rusa lingvo: ŝi pretas akcepti instruadon de la rusa anstataŭ la sveda en lernejoj en orienta Finnlando.

La temo de deviga instruado de la sveda por ĉiuj lernejoj en Finnlando estas ofte debatata. La sistemo de du tutlandaj naciaj lingvoj estas nun firme konstruata kaj perleĝoj konfirmata. Ĉiuj devas en lernejo lerni kaj la finnan kaj la svedan, kaj postulo por akiri multajn oficojn estas la scio de ambaŭ lingvoj. Ŝanĝi tion ne estos facila decido.

Aliflanke ni ĉiuj devas konfesi, ke la dulingveco ne bone funkcias. Averaĝa finno ne povas paroli en la sveda lingvo. Averaĝa finno sidas dum jaroj ĉe lernejaj lecionoj pri la sveda, pasas la ekzamenojn iel laŭ sia kapablo, kaj post tio kutime komencas forgesi la svedan. Por malgranda frakcio el la populacio vivanta dulingveco estas la realo. Taksata kontraŭ ĉi tiu situacio, la deviga instruado de la ambaŭ lingvoj estas malutila stato kaj alternativo estas grave konsiderenda.



Por mi komenciĝis nova fazo en mia vivo. Zorgado pri mia unua filo plenigas miajn tagojn kaj ne plu eblas koncentriĝi al redaktado de ĉi tiu gazeto. La aŭgusta numero tute ne aperis pro manko pri tempo, tial ĉi tiu estas nominale duobla numero. La sekva, decembra, celas jam komenci novan eraon, ni planas reordigojn en la procedoj de la redaktado kaj post tiu mi tute lasos la redaktoran postenon. Certe mi ne tute lasos la gazeton, mi ja intencas verki artikolojn kaj kontribui en iu formo, sed nur laŭ la skalo kiun mia familia vivo ebligas. Nova ĉefredaktoro ankoraŭ ne estas elektita, do mi ripetas: se vi sentas vin esti ĝusta persono por estonte redakti ĉi tiun gazeton, anoncu vin al prezidanto de EAF.

Mikko Mäkitalo

▷ milito, von der Goltz revenis al Baltio kaj organizis militforton kontraŭ la sendependiĝaj movadoj de Latvio kaj Estonio. Tiuj, defendantaj sin kontraŭ bolŝevikaj kaj Goltz-aj trupoj, gajnis venkon en Johantago 1919 en Cēsis (estone Võnnu) en Latvio – cetere la urbeto kie okazos Baltiaj Esperanto-Tagoj en 2011. Bataloj tamen daŭris, Ruslando ne emis rezigni pri siaj Baltiaj ”provincoj”, kaj packontrakto estis atingita nur 2.2.1920 en Tartu, preskaŭ du jar-

ojn post deklaro de sendependeco.

La Germana generalo estas rigardata historie (certe ne unuanime) ia heroo norde de Finna Golfo, sudflanke – fripono. Estas klerige konscii, ke roloj de personoj estas relativaj, same kiel esencoj kaj efikoj de ismoj kaj ideoj. Eĉ en nia malgranda Esperantuja mondo ni tion sperdas. Ni fosas nian sulkon – direkton ni kune kaj konsente difinu.

Tuomo Grundström

La 6a Azia Kongreso en Mongolio

Por multaj Mongolio ankoraŭ estas fora, ekzotika, sed praktike nekonata kaj fermita lando. Post la disfalo de Sovetunio aferoj multe ŝanĝiĝis en Mongolio. Ĝia ĉefurbo Ulanbatoro rapide fariĝis moderna multetaĝdoma metropolitenito. Eĉ tro rapide oni konstruis ĝin, ĉar ĝuste en la centro de la urbo staras altega etaĝdomo, kiun oni neniam uzis. En la konstruado oni ne sekvis sekuregulecojn kaj la domo ne ricevis permeson esti uzata. Jam de kelkaj jaroj oni atendas ĝian malkonstruadon.

En tia lando okazis la 6a Azia Kongreso de Esperanto 19–23 de junio 2010. La kongreson partoprenis ducento da esperantistoj el trideko da landoj. Inter ili estis kvin finnoj (fakte ses, ĉar partoprenis ankaŭ unu finno loĝanta en Francio).

Azia Kongreso de Esperanto estas kvazaŭ UK en miniaturo. Okazis kongresa universitato, diskutoj pri kongreso temo “Azia harmoniigo per Esperanto”, nacia vespero kaj internacia arta vespero. Kompreneble estis pluraj prelegoj pri la kongresa lando: la mongola eksprese, historio, arto kaj kulturo en Mongolio. Estis aranĝita ankaŭ antaŭkongreso kaj postkongreso kaj tuttaga kaj duontagaj ekskursoj. Kunvenis diversaj grupoj, inter ili KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado, laborgrupo de reprezentantoj de UEA kaj ĝiaj landaj asocioj en Azio).

Dum la kongreso estis elektita nova estraro de KAEM. Nova prezidanto estas S-ro Sasaki Teruhiro el Japanio kaj nova vicprezidanto S-ro Hoang Ngoc Boi el Vietnamio. En 2012 okazos Universala Kongreso en Vjetnamio. Pro tio la sekva Azia Kongreso estos aranĝita post tri jaroj. Ĝi okazos en 2013 en Israelo.

Nia finna grupo partoprenis la antaŭkongresan ekskurson, kiu direktiĝis al la stepoj. La teritorio de Mongolio estas preskaŭ kvinobla kompare al Finnlando, sed loĝantoj estas nur 3

milionoj. Kvankam ni veturis 300 kilometrojn for de Ulanbatoro, ni povis vidi nur etan parton de Meza Mongolio. Ni vizitis senfinajn stepojn, sablajn dunojn, kie hazarde okazis ankaŭ muzika spektaklo, kaj malnovan monaĥejon Erdenezuu apud la antikva ĉefurbo de Mongolio Karakorum. De la urbo mem restis nur kelkaj ruinoj.

Dum la ekskurso ni loĝis en jurtoj (mongoloj preferas uzi vorton *gero*). Verdire tio estis turismaj kampadejoj, kie estis eĉ duŝejo kaj necesoj, sed tamen ni spertis la tagan varmon (pli ol 30 gradoj) kaj noktan malvarmon (en la jurtoj estis hejtigilo, sed se ĝi estingiĝis, estis malvarme).

Ni vidis ankaŭ tn. przewalski-ĉevalojn (mongola sovaĝa ĉevalo, mongole *tahi*) en Ĥustaj-parko. Tahi estas la nura plu ekzistanta vera sovaĝa ĉevalo. Ĝi estas alia specio ol nia hejma ĉevalo aŭ ĝiaj kelkloke sovaĝintaj posteuloj. Tahi ĉiam vivis en la mezaziaj stepoj, sed la lastaj en Mongolio formortis en la 60aj jaroj. Konservigis nur kelkaj centoj en okcidentaj zoologiaj parkoj. Troviĝas kelkaj ankaŭ en Finnlando en Korkeasaari. En la 90aj jaroj oni reenkondukis iliajn posteulojn en Mongolion, kie ili nur komencis pliiĝi.

Okazis interesa prelego pri Esperanto en Mongolio. La unua mongola esperantisto estis bonzo N. Khayankhirvaa kiu lernis esperanton en Turkio kaj revenis al Mongolio 1924. Li instruis esperanton al junaj intelektuloj. Dum la socialisma periodo en Mongolio daŭre estis esperantistoj, sed la registaro limigis iliajn eksterlandajn kontaktojn. Nuntempe en Mongolio estas deko da spertaj esperantistoj. La kongreson partoprenis pli ol 40 mongoloj, sed el ili plejparto estis lernantoj kiuj ĝis nun apenaŭ parolas esperanton.

Finna lingvisto G. J. Ramstedt loĝis en Ulan-



Ĵus finiĝis la 6a Azia Kongreso de Esperanto kiu okazis 19.–23. de junio en Ulanbatoro, Mongolio. La kongreso allogis entute pli ol 200 esperantistojn el trideko da landoj, inter ili ankaŭ nian kvin-personan grupon.

batoro 1898–1900. Tiam la urbo nomiĝis Urga. Pri siaj spertoj li rakontis en sia libro “Seitsemän retkeä itään”. Multo, preskaŭ ĉio ŝanĝiĝis dum unu jarcento. Li rakontas, ke la centron de la urbo okupas granda templo, kie loĝas 10–20000 monaĥoj. Nordokcidente de ĝi estas loĝkvartaloj de ĉinoj, sudokcidente t.n. viandourbo kie ankaŭ li loĝis. “Viandourbo” estis kvartalo de buĉistoj, ĉar piaj budhanoj ne povis mortigi animalojn, tamen ĉiuj nutris sin per viandomanĝado en Mongolio. Okcidente de urbocentro sur monteto estis Gandan-templo.

La granda templo komplete malaperis, en

ĝia loko nun estas grandega Suĥbaatar-placo kaj parlamentejo. Antaŭ nur kelkaj jaroj tie eĉ staris maŭzoleo de revolucia heroo Damdin Suĥbaatar. De la tempo de Ramstedt konserviĝis nur Gandan-templo kaj tre interesa loko Choijin-lamaejo, per kiuj oni povas en sia kapo lokigi la malaperintajn urbopartojn.

Kelkaj fotoj pri la vojaĝo de finnoj al Mongolio estas videblaj en la retejo de Esperanto-klubo de Helsinki <http://esperantohelsinki.wordpress.com/>.

Sakari Kauppinen

Universalaj kongresoj 2010 en Havano, 2011 en Kopenhago

La 95a UK en Havano, Kubo estis tiel fascina kiel ni antaŭatendis. El Finnlando estis dek partoprenantoj, inter ili ankaŭ unuafojaj kongresanoj. Kelkaj havis eĉ eblecon pli longe sperti la gasteman, varman landon kiam ili partoprenis en antaŭ- kaj postkongresoj aŭ en ILEI-kongreso en Matanzas aŭ en IJK en Villa Trópico.

Ni finnoj videblis bone en la Movada Foiro, kiu jam estas tradicio en la unua interkona vespero. Ni povis bone interkonatiĝi kun la homoj ĉe la aliaj budoj kaj bonvenigi ilin al la nia. Tie ni entuziasme reklamis kaj parolis pri niaj venontaj aranĝoj, i.a. pri partopreno al Eukonkanto-festivalo kaj pri kursosemajno en Valamo.

En la malfermo Sirkka Mattlin bele salutis por Finnlando kaj diris finne la petitan frazon de poeto José Martí: Gepatrolando estas homaro (isänmaa on ihmiskunta). Plejparto de la salutantoj faris la saman per sia propra lingvo.

Jam aperis multaj raportoj kaj rakontoj pri la kongresaj eventoj. Vi certe legis ilin el la reto kaj el revuoj Esperanto kaj La Ondo. En tiu ĉi numero de nia propra gazeto aperas ĉarma rakonto de Keke Uber pri la Internacia Junulara Kongreso. Ni kun Keke estis la estraranoj de EAF, kiuj partoprenis la UK:n. Mi havis krome



Tiina Oittinen kaj Keke en Havano.

la honoron reprezenti EAF:n kiel anstataŭanto de A-komitatano en la komitatkunsido. Pri la kunsido estis detalaj raportoj en la revuo Esperanto kaj en la retpaĝoj de UEA. Dum la jaro estas eble sekvi la komitatajn aferojn tra la retpaĝoj de UEA.

Ek al Kopenhago

Kiel ni scias, la venontjara kongresurbo estos Kopenhago kaj la kongresa semajno 23–30 de julio. Tien ni denove povos aranĝi karavanon per propra aŭtobuso. Preparlaboroj jam komenciĝis. Ekveturo estos ĵaŭde vespere antaŭ la kongreso kaj la itinero pasos kompreneble tra Svedio, kie ni tranoktos. Reen ni startos tuj post la fermo sabate kaj denove okazos unu tranokto dumvoje. Se vin interesas la komuna veturado, bonvolu informi al ni en EAF. Vi povas ankaŭ proponi vizitlokojn dum la vojaĝo. Kontaktuloj estas la sekretario kaj la vicprezidanto (kontaktadreso en paĝo 2).

Kiinnostaisiko yhteinen bussimatka Kööpenhaminan maailmankongressiin ensi kesänä? Kongressiviikkohan on 23.–30.7.2011. Suomen Esperantoliitto suunnittelee taas karavaania omalla bussilla. Lähtö Suomesta torstai-iltana ennen kongressia, ajomatka Ruotsin läpi, jossa yksi yöpyminen. Paluumatka alkaa kongressin päättäjäisten jälkeen ja matkalla yövytään jälleen Ruotsinmaalla. Ilmoittaudu alustavasti liiton yhteyshenkilöille, näin saamme tietää kuinka moni on innostunut osallistumaan. Ensimmäiset valmistelut on jo tehty.

*Lisätietoja antavat liiton sihteeri Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi, puh 050-549 4709 ja liiton varapuheenjohtaja Päivi Saari-
nen, eaf@esperanto.fi*

Mia unua IJK – tropika paradizo


Mi flugas nun hejmen al Finnlando tute nestreĉita post la 66a IJK (Internacia Junulara Kongreso) en Villa Tropicó apud Santa Cruz de la Norte, proksimume 60 km oriente de Havano en Kubo. Estis tre bela loko por junulara kongreso – plaĝo kun blanka sablo kaj blua akvo, individuaj, du- aŭ trilitaj dometoj, granda naĝejo kaj belaj naturaj ĉirkaŭaĵoj. Ĉiuj manĝaĵoj estis inkluzivitaj kaj surprize, ankaŭ drinkaĵoj kaj trinkaĵoj, ekzemple kubo libre, mojito, ktp.

Entute partoprenis pli ol 130 homoj. Du el Finnlando: mi kaj Kari Pyykkö. La ne tro ampleksa programo estis taŭga por la loko – sufiĉe da tempo restis por naĝi, akvobicikladi, spiritubnaĝado, eĉ boatado tute sen ekstraj kostoj. Vetero estis bona, ĉiutage la suno brilis, nur du fojoj rapide pluvegis, kiel estas kutima en tropikaj landoj.

Por la pli aktivaj, okazis sportprogramo, inter aliaj volejbalo (kaj en la naĝejo kaj surtere) kaj piedpilko. Dufoje estis aranĝita montgrimpado, kiu ne estis tro malfacila kaj el la plej supra loko la premio por la longa ŝvita migrado estis nekredebla vidaĵo de la ĉirkaŭa marbordo kaj ĝangala arbaro. Post la migrado, la lokaj loĝantoj ofertis freŝajn fruktojn – mangojn, guavojn, ananasojn kaj berojn. Ili montris ankaŭ bestojn: kutimajn kokinojn, kaprojn kaj kuniklon kaj pli nekutimajn aligatoron kaj testudon.

Restis multe da tempo por interkonatiĝi kun aliaj kaj babili eĉ tra la nokto. La komuna manĝejo, kiu havis bufedon tri foje ĉiutage, donis bonajn ŝancojn por renkonti iujn novajn. Ankaŭ en la du drinkejoj, unua apud la naĝejo kaj la alia pli proksima al la plaĝo, troviĝis babilemaj samideanoj.

Temis ne nur kuŝado sur la plaĝo aŭ trinkaĵoj apud la naĝejo, prelegoj kaj kursoj ankaŭ donis pli seriozan flankon al la aranĝo. Kursoj pri



Keke en la kavernoj de Bellamar kun Guillermo de la ensemblo Amindaĵ.

salsadancado, rock and roll dancado, hispana lingvo kaj kompreneble kursoj de esperanto por komencantoj kaj progresantoj estis popularaj. Estis multaj prelegoj pri TEJO, agadoj kunlabore UN (Unuiĝintaj Nacioj), spiritismo, disvastiĝigo de esperanto, ĝisdato pri interreta agado, nacia vespero, ktp. Ne forgesu la oficaĵn kunvenojn de TEJO.

Kvankam la kongresejo estis ideala, ni havis tempon ankaŭ por ekskursoj – du grupoj: la unua al La Habana kaj la alia al Matanzas. Mi partoprenis en la dua, dum kiu ni vizitis muzeon de unu malnova farmacio kaj subeniris la teron en la kavernoj de Bellamar, nekredebla vasta ▷



La vidaĵo post montgrimpado. Malantaŭe maldekstre la kongresejo de IJK.

subtera tunnelsistemo.

Arto ankaŭ ne estis forgesita, fakte inverse, ĉiunokte okazis riĉa kultura programo. La stelo de la aranĝoj estis Amindaj, 8-membra ensemblo de Santiago de Kubo. Ili ludis esperante, kaj originajn kaj tradukitajn kanzonojn, en la kuba stilo. La bando estis tiel ŝatita, ke estis farita monkolekto por sonregistri kaj eldoni albumon. Espereble estos aĉetebla ankaŭ DVD, ĉar la tuta grupo, inkluziva du dancistinojn, faris neforgeseblan spektaklon. Esperantlingva diskejo, legado de poemoj kaj komediaj skeĉoj kompletigis la artan programon.

IJK ne estas nur por junuloj, fakte ne ekzistas aĝlimo. Partoprenis multaj pli maljunaj. La sek-

va IJK okazos en Kyiv, Ukrainio ekde la 14a ĝis la 21a de julio 2011. Mi rekomendas IJK:n kiel agrabla ferio por ĉiuj esperantistoj. Estos ankaŭ postkongresa ferio kun ebleco vidi aliajn urbojn de Ukrainio. La retejo kaj aliĝilo troviĝas ĉe <http://www.ijk-67.retejo.info/>

Mi elkore dankas la teamon de aktivaj, bonkoraj kaj amikecaj kubaj esperantistoj pro ilia senĉesa laboro kaj elstara rezulto. Mi neniam forgesos mia unuan IJK-n sub la sunbrilo en Kubo.

Keke Uber

Somera turneo, kurseto kaj intervjuoj

Anstataŭ la kursosemajno en la Popola Instituto de Valamo, kiu bedaŭrinde devis esti nuligita pro manko de partoprenantoj, Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) aranĝis inter la 26an de junio kaj 2an de julio turneon de la multjara instruisto Atilio Orellana Rojas. La vizititaj lokoj estis Turku, Tampere, Lahti kaj Helsinki. Dutaga elementa kurso okazis en feria kursejo proksime de Lahti. Pri la turneo estis sendita gazetara komuniko al amaskomunikiloj.

La turneo komenciĝis el Turku, kie deko da esperantistoj kolektiĝis en renkontiĝo dimanĉvespere. Alia eksterlanda gasto, s-ino Telma Oliveira Ribeiro, venis el Brazilo. Lunde okazis vizito al la ortodoksa preĝejo de Turku kaj al la ĉefbiblioteko, speciale ĉe bretoj kun esperantlingva belliteraturo.

Post komuna lunĉo en restoracio Koulu ("lernejo") Atilio kaj Tiina ekveturis al Tampere kaj renkontiĝis tie la antaŭen-anojn en la ĉefbiblioteko Metso. Sekvan tagon ili revenis al la biblioteko por viziti la Muminvalo-ekspozicion en la teretaĝo. Por Atilio tio estis la unua vizito tien, ĉar li ne havis la tempon partopreni la ekskurson dum la UK en Tampere en 1995. Poste ili kun Terhi kaj Jukka Laaksonen ankoraŭ vizitis la laboristan muzeon de Amuri-kvartalo en Tampere.

La kurso kaj somera renkon-

Bildo de partoprenantoj en la renkontiĝo en feriakursejo Lepola proksime de Lahti. Fotis Aura Mikkola.

tiĝo de esperantistoj en Lahti okazis de merkredo al ĵaŭdo. La elementan kurson de Atilio partoprenis kvar gelernantoj. Aliaj partoprenantoj, entute dudeko, uzis la lingvon en praktiko diskutante kaj ludante. Ankaŭ Telma el Brazilo kunestis inter la partoprenantoj kaj povis saŭni kune kun la aliaj virinoj. Kaj kompreneble okazis ankaŭ kolbasfritado, kiu kun saŭnado ja estas deviga elemento en finnaj someraj renkontiĝoj en la kamparo. Ĝoje la vetero estis belega kaj varma.

La gazetara komuniko de EAF estis mirinde sukcesa, kiel vi jam povis legi en informlisto EAF-agadas, en retpaĝoj de EKH kaj en resummo *Muut lehdet* (aliaj gazetoj) de tiu ĉi numero. La intervjuo de Atilio okazis en la oficejo vendredmatene kaj poste li i.a. butikumis kun Päivi kaj Tiina en Helsinki. Vespere estis denove renkontiĝo kun esperantistoj, ĉi-foje kun helsinki-anoj.

Esperanto-Asocio de Finnlando estis tre kontenta pri ĉi-jara somera evento, speciale ĉar pro nuligo de kursosemajno ĝi estis iom improvize aranĝita. Elkoran dankon al ĉiuj partoprenantoj el Turku, Tampere, Lahti kaj Helsinki.

Tiina Oittinen



Ludilmuzeo rakontas pri historio

La ludilmuzeo en Suomenlinna/Sveaborg enhavas nekalkuleblajn ludilojn de la komenco de la 19a jarcento ĝis la 1960aj jaroj. La aĵoj estas ordigitaj laŭ temoj kaj tempofluo. En ili speguliĝas la ŝanĝoj ne nur en la modo sed en la kulturo kaj konduto: knabina kaj knaba roloj, milito, vivo en bieno aŭ en monduma urba familio, edukado, instruado, dommastrumado, milito, metioj. Multaj ludiloj ne estis faritaj por ludantaj infanoj sed por adolta admirado kaj ornamo. La plej malnovaj rompiĝemaj ludiloj devas esti ŝirmataj eĉ en fridujo. Ĉiuj ludiloj bezonas respekton kaj prizorgadon. Ili ne nur

vekas niajn proprajn infanaĝajn memorojn tiel ke ni interparolu pri la pasinto sed ili kreas intergeneracian ponton de geavoj al genepoj.

La muzeo situas en ĉarma vilao de la cara tempo, kiun reflektas ankaŭ la kafejeto kun siaj meblaro, ujaro kaj frandaĵoj. La nuna muzeistino Petra Tandefelt daŭrigas la laboron de sia patrino Piippa. Ŝia sinteno al Esperanto estis favora kaj komprenema, kiam mi vizitis la muzeon en novembro-decembro 2009. Kutime la muzeo estas malferma nur somere. Vidu www.lelumuseo.fi.

Saliko



"Masha" Bebe Jumeau (Parizo, 1890).



"Hans" Käthe Kruse (Germanio, 1930aj jaroj).

HORI Jasuo:

Raportoj el Japanio 13

Eldonejo Horizonto.

Prezo 14 eŭroj. 186 paĝoj.

Duono el la raportoj de la 13a japana raportaro priskribas politikajn, ekonomiajn okazintaĵojn kaj sociajn trajtojn de vivo en Japanio en la 2009a jaro. La alia duono rakontas diversajn travivaĵojn, sortojn, individuajn opiniojn. Povas esti, ke la unue menciitaj temoj ne ĉiam akurate kompreneblas – kvankam la lingvaĵo estas klara – se la leganto ne atente sekvis pasintjarajn novaĵojn de Japanio. Kelkaj temoj eble rapide malaktualiĝos. La alia duono tamen ĉiam restos proksima kaj interesa al legantoj, inter aliaj la sekvaj temoj:

– Kial japanoj ofte metas maskon antaŭ sia buŝo/nazo?

– Kial oni bezonas anstataŭantojn en geedz-igaj festoj?

– La futuro de sakuro-floroj kaj la sinteno de japanoj al la floroj.

– Ĉiutagaj rakontetoj pri la vivo de infanoj.

Same kiel la antaŭaj Raportoj, la verko enhavas statistikojn, historietojn pri Japanio, mapon, sciigojn pri la aŭtoro, estrarano de UEA. La tutan verkon karakterizas lia pacamo, humana komprenemo, agado por defendi civitanon kontraŭ malsaĝaj registaraj kaj merkataj decidoj kaj precipe la agado de pacamantaj japanoj kontraŭ militoj.

Saliko



*Paula kaj
Jean-Jacques*

”Ĉu vi parolas Esperanton?”

estis la surpriza demando al ni, kiam ni dum semajnfina ekskurso matenmanĝis en la helsinka studenthotelo ”Satakuntatalo” je 25a julio.

La fervora franca bicikloŝatanto Jean-Jacques Moreau rimarkis la vorton ”Esperanto” sur mia

ĉemizo, kaj kaptis la okazon forlasi sian apude sidantan franc-rusan grupon por inspira babilo kaj pruvo, ke la lingvo ja estas uzata.

Pravas skoltoj kun sia moto ”Ĉiam preta” – ĉiam estu rekonebla kiel parolanto, kaj surprizoj sekvos.

Robert Bogenschneider

Granda fajro en Bona Espero

Ampleksa incendio detruis grandan parton de la teritorio de Bona Espero, esperantista orfejo en Brazilo. La granda grundofajro trafis la regionon en la tria semajno de septembro, sed ne atingis la ĉefajn konstruaĵojn de Bona Espero.

En letero sendita al subtenantoj de la projekto, la esperantistaj estroj de la orfejo, Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, rakontas pri la okazaĵo:

”... Ni saviĝis el grandega fajro, kiu alvenis fortege nokte de la nordo. Se estus dumtage, oni pli sekure povus batali kontraŭ la flamoj, sed nokte ĉiuj bestoj, ĉefe la serpentoj fuĝas de la fajro rekte al la homoj, kiuj volas kontraŭbatali... Tamen ni sukcesis defendi niajn domojn kaj legomejojn. Ĉe la lago ĉio estas nigra, kaj eĉ brulis la elektra drato kaj iom da tuboj...”

Dum la nokto la laborantoj kune kun la infanoj provis haltigi la fajron ĉe vojo, por savi la

konstruaĵojn:

“... Feliĉe ni sukcesis. Sed 90% de la tuta teritorio de Bona Espero, inkluzive de ĉiuj najbaraj grundoj brulis, kaj la fajro ĝis nun ne haltis. Ĝi nun devoras la parkon, kiun oni provas defendi per du malgrandaj aviadiloj, sed ne sukcesas. Ĉio brulas...”

La prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, en mesaĝo sendita al la retroŝta listo de UEA-membroj alvokis ĉiujn laŭeble doni financan subtenon al Bona Espero, por ripari la damaĝojn.

(László Szilvási en Ret-Info)

artikolo en Libera Folio, kun pliaj informoj:

<http://www.liberafolio.org/2010/granda-fajro-en-bona-espero>

Rezolucio de UK

La 95-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Havano (Kubo) kun 1002 partoprenantoj el 59 landoj,

Konsiderante, ke Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2010 Internacia Jaro de Interproksimigo de Kulturoj, konstatas

– ke la diverseco de kulturoj en la mondo grave kontribuas al la riĉeco de la homaro;

– ke jam dum 123 jaroj Esperanto kiel neŭtrala lingvo helpas konstrui pontojn inter popoloj kaj kulturoj, kaj

– ke la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kunigante homojn el plej diversaj landoj tra la mondo, mem atestas tiun kapablon konstrui pontojn,

Deklaras la deziron de la Esperanto-parolantoj kunagi kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por stimuli komprenemon inter popoloj kaj samtempe protekti la identecon de ĉiuj homgrupoj, kaj invitas Unuiĝintajn Naciojn kaj Uneskon

plene eluzi siajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio por efike realigi siajn celojn.

Havano, 24 julio 2010

(el komuniko de UEA prenis mm)

La komitato de UEA elektis

La Komitato de UEA povis efike eklabori en sia unua kunsido en Havano sabaton, la 17-an de julio. Probal Dasgupta estis reelektita kiel prezidanto per 26 por, 2 kontraŭ kaj 4 sindetenoj. Claude Nourmont kiel vicprezidanto ricevis respektive 26, 4 kaj 2 voĉojn, kaj Barbara Pietrzak kiel ĝenerala sekretario per 27, 4 kaj 1 voĉoj. Same kiel antaŭe, Nourmont plu respondecos pri edukado, kulturo kaj kongresoj kaj Pietrzak pri informado. Loes Demmendaal reelektiĝis kiel estrarano pri financo kaj administrado per 28, 2 kaj 2 voĉoj. Tri estraranoj estas novaj: Maritza Gutierrez pri landa kaj regiona agado (resp. 26, 3, 3), Stefano Keller pri eksteraj rilatoj (24, 3, 5) kaj Amri Wandel pri

sciencia kaj faka agado (23, 5, 4). Kvankam ne en la tuj antaŭa periodo, Gutierrez estis estrarano jam pli frue dum unu mandato kaj Wandel dum du mandatoj.

Kiel komitataj reviziantoj estis elektitaj Paulo Branco kaj Marcel Delforge unuanime. Ambaŭ ricevis 29 porajn voĉojn; du sindetenis. Simile elektigis ankaŭ la membroj de la Financa Komisiono. Flory Witdoeck ricevis 30 porajn voĉojn kun 1 sindeteno, Gianfranco Polerani resp. 29 kaj 2, kaj Josep Franquesa Sole 28 kaj 3.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Jarlibro 2010 aperis

Portreto de Giorgio Canuto malfermas Jarlibron 2010 de UEA, kiu aperis meze de junio. La ŝatata itala jurmedicinisto prezidis UEA de 1956 ĝis sia forpaso en 1960. Lia nomo pluvivas en la nomo de la fondaĵo de UEA, kiu kolektas donacojn por membriĝi en UEA esperantistojn en malriĉaj landoj.

En tre persona antaŭparolo la UEA-estrarano Hori Yasuo rakontas, kiel en diversaj okazoj la Jarlibro, precipe ĝia Delegita Reto, utilis kaj helpis al li. "La Jarlibro malfermis novan mondon al mi", li skribas memorante sian unuan sperton pri ĝia utileco en malfrua sabata vespero en Bratislavo.

La daŭran popularecon de la Jarlibro de UEA montras ankaŭ, ke nur 70 membroj de UEA respondis, ke ili ne bezonas la paperan Jarlibron, kiam la Centra Oficejo enketis pri tio inter la membroj, kies retadreso estas konata al la CO. Ankaŭ tiuj, kiuj povas konsulti la retan version de la Jarlibro en reto.uea.org, tamen ŝatas ricevi ĝian presitan version.

La nombro de delegitoj malkreskis el 1735 al 1679 adresoj en 101 landoj. Aperas adresoj k.a. informoj pri la organoj, instancoj kaj servoj de UEA kaj TEJO, pri landaj kaj fakaj asocioj, akademioj, edukaj kaj kulturaj instancoj, bibliotekoj ktp. Apartaj ĉapitroj estas dediĉitaj

al radioelsendoj en Esperanto kaj al Esperanto en Interreto. Fine de la Jarlibro troviĝas du rabatkuponoj de la Libroservo de UEA.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Mauro Nervi en Malferma Tago

Mauro Nervi, elstara Esperanto-poeto kaj prezidanto de la Akademio Literatura de Esperanto, estos la ĉefpreleganto de la 33-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 27-an de novembro. Nervi prelegos dum la Tago dufoje: pri la idea esenco de la Akademio Literatura kaj pri la Esperanta kandidato por la literatura Nobel-premio Baldur Ragnarsson.

En la programo estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

(el komuniko de UEA prenis mm)

UEA en Facebook havas pli ol 1500 amikojn

La paĝo de UEA en Facebook havas jam pli ol 1500 amikojn. La 5-an de aŭgusto la nombro estis 1507. La paĝo estis kreita la 8-an de novembro pasintjare, kiam la unuan mesaĝon en ĝi afiŝis Ulises Franco el Meksiko.

3% de la amikoj aĝas 13-17 jarojn, 16% 18-24 jarojn, 22% 25-34 jarojn, 17% 35-44 jarojn, 18% 45-54 jarojn kaj 19% pli ol 54 jarojn. La pintaj lingvoj de la amikoj (t.e. kiulingvan version de Facebook ili uzas) estas: angla 389, Esperanto 270, hispana 213, franca 82, portugala 76, itala 69, pola 60, germana 46, rusa 28, hungara 22, sveda 20, finna kaj nederlanda po 16, litova 15, ĉeĥa 14, bulgara 12, kataluna 11, japana 10.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Rezultoj de la belartaj konkursoj de UEA

Poezio: Unua premio ne aljuĝita; Dua premio: Josip Pleadin (Kroatio) pro "Antaŭ via foriro"; Tria premio: Josip Pleadin pro "Ekzistas ie kaŝita loko". Partoprenis 29 verkoj de 16 aŭtoroj el 13 landoj.

Prozo: Unua premio: Edmund Grimley Evans (Britio) pro "En katedralo"; Dua premio: Sten Johanson (Svedio) pro "Verda ondado"; Tria premio: Luiza Carol (Israelo) pro "La deturniĝo"; Honora mencio: Paulo Sergio Viana (Brazilo) pro "Rulseĝo". Partoprenis 50 verkoj de 30 aŭtoroj el 14 landoj.

Eseo: Unua premio: Christian Rivière (Francio) pro "Vortfarado kaj radikfarado"; Dua premio: Doron Modan (Israelo) pro "L'espero, l'obstino kaj la pacienco"; Tria premio: Paulo Sergio Viana (Brazilo) pro "La literatura vivo de Esperanto". Partoprenis 9 verkoj de 8 aŭtoroj el 6 landoj.

En reta brokantejo ankaŭ periodaĵoj

Multaj valoraj Esperanto-libroj estas malfacile haveblaj, ĉar ili elĉerpiĝis. La fako de brokantaĵoj en la Libroservo de UEA jam de longe proponas solvon por tiuj, kiuj serĉas elĉerpitajn titolojn. La reta brokantejo troviĝas ĉe <http://katalogo.uea.org/index.php?st=brok>

La nova brokantejo de periodaĵoj troviĝas ĉe http://katalogo.uea.org/index.php?st=brok_periodajhoj, kie la periodaĵoj estas ordigitaj alfabeto laŭ la titolo. Se iu revuo ne videblas en la katalogo, tio signifas, ke ĝi momente ne estas havebla. Inter la periodaĵoj mankas la revuo Esperanto, de kiu UEA tamen havas unuopajn numerojn kaj eĉ kompletajn jarkolektojn de multaj jaroj. Pri ili oni povas informiĝi ĉe libroservo@co.uea.org.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

